



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 130 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. Aprilo, 1931

SHALL WE WEATHER THE STORM?

Deficit of £7 for 1931.

The first three months of 1931 have proved the most disastrous for the Suda Kruco since April, 1929, when I took over the editorship from Mr. Percy Hudson. For the period named the expense of producing the three issues was £14/10/-, while receipts from subscribers amounted to only £7/14/-.

The seriousness of the position may be more accurately gauged when it is known that for the term January-March, 1930, receipts were £21/10/- against the expenditure of £15/-/-. Included in those receipts were some £11 in gift and advertisement that enabled the S.K. to survive 1930 with a small credit balance for that year. To-day, however, we are again face to face with the unpleasant task of liquidating a deficit for the young year of nearly £7. How can this be done?

Now, there is a sum of about thirty pounds outstanding in subscriptions owed by Esperantists still receiving the paper. I am very hesitant in stopping their copies, as several have paid 10/- or a pound after even three years' silence. Surely an appreciable part of this large sum could be paid without further undue delay. Then there are certain sums guaranteed in early 1930 by well-wishers, some of which money is still held by them. Unsatisfactory as it is to feel that the organ subsists, even in part, by the generosity of a bighearted few, and that it is still unable to take pride in its self-support by reason of its inherent value to those that read it, I feel that only by a fresh call to spread the burden over several shoulders can the S.K. be given further life. It seems hardly necessary to emphasise the point that a loss of £7 in

three months is too much for one unaided to bear; other responsibilities stand ever waiting to be met by its editor, whose reasonable desire and aim it is, to make a self-respecting Suda pay its way.

It is clear that the economic situation and the consequent unemployment lie at the bottom of the trouble. Were the times normal, it is safe to say that the S.K. would have been well out of danger to-day, for some of its most soundhearted supporters are without work and therefore unable to spare even the penny a week that constitutes their subscription. May I, then, urge that ALL who are blessed with work or other means strive their utmost to save our organ from announcing its final number. Were such announced I gravely doubt whether, for many long years, Australian Esperantists would again find pride in an organ of their own.

Regrettable as it is, conditions compel me to fix 28 May as a day of drastic decision. Should the answer to this appeal be then found insufficient to meet the deficit of this year, your editor will feel warranted in interpreting it as a mandate to take a step as painful to him as to anyone. Let us pool our available strength to avoid it.

R. Banham (editor La Suda Kruco).
28 March.

PLEASE NOTE.

Would Australian subscribers kindly use **open postal notes**, instead of, as hitherto, filling in the name R. Banham and the post office.

TO OUR SUPPORTERS

We give thanks for the following renewals, etc.:—

Mr. P. Holmes, 4/6, jan., '32; sales

Coburg Club, 1/8; Mr. Archer, 10/-, jan., '33; Mr. R. Cleary, 4/6, april, '32; Miss E. Carrick, 4/6, March, '32; sales W.A., 2/-; Mr. E. McKenzie, 5/-, April, '32 kaj donaco 5/-.—Total, £27/2.

J. G. PYKE MEMORIAL EXAMINATION.

Members of the Melbourne Esperanto Club, feeling that they would like to perpetuate the memory of the late Mr. Pyke in a way both fitting and practical, have decided that this can best be done by establishing an annual examination as outlined in the following rules:—

1. That the examination be called "The J. G. Pyke Memorial Examination."
2. That it be both written and oral. The written to be such as would show that the candidates have a thorough knowledge of the grammatical points and the ability to write clear and correct Esperanto. The oral to demonstrate that the candidates can make practical use of the language.
3. That the examination be held in Melbourne during the last week in November or on an approximate date to be arranged by the examiners.
4. That the examination be open to all Esperanto students residing in Australia, and those successful in gaining 66 2/3% of possible marks be awarded a certificate of competency.
5. That a special prize of five guineas be awarded to the student gaining the most successful pass, competition being restricted to those who have commenced the study of Esperanto not previous to January 1st in the year in which they are competing.
6. That students competing for the five guinea prize forward a declaration signed by the group secretary certifying he or she commenced the study after January 1st in the year in which he or she is competing. Isolated students to sign a statutory declaration.

The examination will aim at eliciting whether the student has a practical knowledge of Esperanto. There will be no dry-as-dust translations or catch questions, and the oral section will be so arranged as to test whether the

candidate is able to converse fluently in Esperanto on subjects of every-day interest. No attempt will be made to compete with the Diploma examination of the B.E.A.; in fact, both examinations could be held on the same day.

The prize of five guineas, awarded to the student who gains the highest pass after only one year's study, will, we expect, entitle the winner to be recognized as the best student in the Commonwealth for that year.

The examination will **not** be done by correspondence. For the first year all candidates must present themselves in Melbourne, but it is hoped that Examining Boards will soon be appointed in other States.

To assure a firm foundation a capital fund is being established. The amount necessary to provide the yearly prize money and expenses is £130. This will be raised by donations, concerts, social evenings, and collections. Until the full amount is collected the prize money and expenses will be taken from the capital fund.

Groups can help by collecting donations and arranging evenings for the fund. Individual Esperantists can send their own donations and collect among their friends.

All contributions sent to Mr. Rawson, 185 Exhibition St., Melbourne, will be gratefully acknowledged. Suggestions in general will also be welcome.

Yours sincerely, W. J. Drummond, E. McKenzie, R. R. Rawson, Trustees of the J. G. Pyke Memorial Fund.

MIAJ IMPRESOJ PRI AŬSTRALIO (de I. Seriŝev) (Finata)

Komparu la konduton de la rusa pia popolo kun tiu de Aŭstralio en tiuj sanktaj tagoj, kaj vi eble respondos nee al la demando de aŭstralia baptista pastro Leederer, kiu verkis la flugfolion sub la titolo, "Ĉu devas esti Rusujo evangelizita?" Li forgesis, ke ĝi estis evangelizita antaŭ jarmilo, ke la rusa popolo estas reale la plej pia kaj "Dio-en-koro-portanta," laŭ esprimo de fama rusa psikologiulo kaj tutmonde konata verkisto, Dostoevskij.

(4) Huliganeco.

En Aŭstralio estas divastigata huliganeco, eksterdoma diboĉado. Mi pensis, ke nur en dumrevolucia Rusujo disvolviĝis masa huliganeco, sed neat-

endinte en kultura Aŭstralio mi trovis la samon. Ne estas sendangere en multaj partoj de Sidnejo trapasi stratojn vespere aŭ nokte: iu tre povas rabi aŭ bati vin, aŭ, se vi estas virino, perforti aŭ timigi. En Aŭstralio ordinare en la eduksistemo mankas instruoj pri estimo al laboro de aliaj homoj, respektado al tio, kio apartenas al socio aŭ apartaj personoj. Kontraŭe, regas principo de barbaroj: ne estas la mia. do— difektu. Abomene malkultura inklino. Oni ne kontraŭbatalas tion. Jam de infanaĝo idoj kutimas ne estimi fremdaĵojn, nepropiaĵojn. Ĝuligianismo naskas ondon da krimoj; jen kial en Sidnejo estas tiom da senleĝeco.

(5) Negastemo.

Ili ne ŝajnas esti gastemaj. Rusojn tre frapas komence, vidi, kiel vizitantoj ne estas enlasataj en la hejmon, sed estas akceptataj sur la doma sojlo, kaj tiamaniere oni konversacias iafaje eĉ longe. Gasto staras ĉe la sojlo, la mastro aŭ mastrino interne en la koridoro apud la sojlo, kaj ili babilas. Sidante en verando dommaŝtro ne invitas gaston internen, sed parolas kun li, staranta sur la trotuaro. Serĉante laboron mi vizitis katolikan pastron. Li akceptis min ĉesojle, manojn siajn metinte sur la pordon, tiel ke mi ne povu eniri. Laŭ rusa vidpunkto tio estas malgasteme. Se iu volas regali vin, li invitas en restoracion. Tio estas angla maniero de gastigo. La esceptoj nur jesigas la komunan kutimon.

(6) Rigideco de kutimoj

montras nealtan spiriton kaj nekleran edukitecon de la popolo.

Mi pensis, ke se mi venis en landon de demokratio mi vidos popolon, kiu ne multe atentis pri vesto en la senco, ke ĝi ne faras veston aŭ modon esti idolo. Sed reale mi trovis, ke la vira modo regas severe en la lando; sen kolumo, manumoj kaj kravato homo ne estas alte taksata, kaj li preskaŭ ne havas ŝancon trovi eĉ trivialan laboron. Mi tion spertis.

Ankaŭ rilate al razoj de lipharoj, barbo kaj vangharoj. Tio estas absolute necesa, recipe pri vangharoj. Tial la stilo de razumita loka loĝanto estas tute tipa, sed nebela. Komparu tipon de razulo kun tiaj barbuloj, kiaj estas Karl Marks, hinda Rabindranat Tagore, Darvin, kaj aliaj; barbo beligas viran vizaĝon, kaj almenaŭ ne malbeligas ĝin. Kaj persekuti tiun naturan ornamaĵon de viro estas strange.

Tamen barbuloj ne havas ŝancon trovi bonan laboron, kaj vangoharuloj ne trovas ajnan. Mi estis persekutata pro nekutimo razi min tre ofte. "Estas barbarismo," oni min diris. "Estas barbarismo via postulo pri tuta razumado," respondis mi. Tia postulado estas granda perforto al la personeco. Je nomo de kio?

Mi zorgas serĉis belajn, majestajn tipojn de viroj en Aŭstralio, kaj neniam trovis: sed en Francujo, Ruslando, vi sur ĉiu paŝo trovas la belan tipon de vireca viro.

Mallargeco de menso loĝantara estas ĉiupaŝe evidenta. Aperas homo en nekutime vidata vesto, aperas viro kun longa barbo, portas homo nemedan veston — pasantoj ekhaltas por rigide esplorrigardi kvazaŭ ili estas sovaĝuloj neniam vidintaj tian mirindaĵon.

Mi aŭdis, ke hinoj ne povas uzi tie ĉi sian naciĵeston, ke japana kimono estas nepermesita, kaj se iu aperus en tia vesto policano kaptus la kuraĝulon kiel ofendanton al leĝo. Ĉu ne strange, tion vidi en la lando de libero kaj demokratio? En Ruslando homoj povas porti sian naciĵeston, kaj neniu miras pri tio.

Pastroj katolikaj kaj ortodoksaj ne povas uzi sian talaron sur strato, ĉar knaboj ne lasas ilin trankvile pasadi. Ĉio, kio estas ekster normo altiras la scivolemon de loĝantoj.

Lokaj homoj tre malmulte konas pri aliaj landoj, kaj tre supersatas la sian, pensante, ke nur la aŭstraliaĵoj estas bonaj kaj raciaj.

Kiam fremdulo kun erara akcento kaj neĝusta stilo parolas ilian lingvon, eĉ inteligentuloj indulge ridetas, kvankam tre ofte ili mem ne povas paroli fremdan lingvon. Ili sentas sian superecon nur pro tio, ke ili perfekte parolas sian naciĵeston, kaj tute ne sentas, ke fremdulo, kiu povas paroli kvankam ne perfekte en 3-4 lingvoj, ja superas ilin.

(7) Kelkaj Strangaj Kutimetoj.

Rusoj kutimas pensi, ke fajfado per lipoj estas tute nebona kutimo por virinoj; inteligenta ruso ne fajfas. En Aŭstralio estas kutime eĉ por virinoj fajfi. Sed nin frapas, ke per fajfo oni vokas hundon; tion faras eĉ tre inteligentaj virinoj kaj fraŭlinoj. En Rusujo nur hundojn oni alvokas fajfe.

Min ĉiam mirigas fakto, ke loĝantoj timas aŭ malŝatas sunon. Ja la klimato de N. S. Kimrujo ne estas tro varma,

kaj la suno estas sandona por korpo. Tamen en multaj ĉambroj eĉ ne troviĝas fenestro; loĝantoj ŝatas mallumon ĉambre; se estas multe da lumo ili uzas pezajn kurtenojn. Des pli tio estas stranga, ke aŭstralianoj volonte vizitas marbordon, por longe sin bani en sun-radio.

Malbone impresas la troa eteco de domkortoj. Oni ne havas sufiĉe da spaco por infanoj ludi, por eksterdoma ripozo, por ĝardenaraĝo. Nemalmultaj estas domoj, kiuj tute ne havas korton. Min persone mirigas, ke loka polico ofte malabundas en tiuj lokoj, kie ĝi estas plej bezonata, kaj abundas en lokoj malpli bezonantaj ĝian servon. Ekzemple, mi loĝas en la Sidneja urbdistrikto Surry Hills, konata pro diboĉado, huliganeco, krimado, prostituado, drinkado. Ekzistas multe da mallarĝegaj substrataĉoj, kie geviroj drinkas, amoras k.t.p. kaj neniam polico venas.

(8) "Blanka Aŭstralio."

La principo de "blanka Aŭstralio" estas maljusta. Ĝi estas opozicia al la principo de vera demokratismo. Se vere kaj juste, ke Aŭstralio devas aparteni al blankuloj, tiam estas vera la principo de azianoj, ke Azio estu por azianoj. Tamen tiu lasta principo tre ne plaĉas al la blankhaŭtuloj.

• Se koloraj rasanoj devas esti pelataj el Aŭstralio, tiam estos plene juste, se Aŭstralianoj kaj aliaj blankuloj estos pelataj el Azio. Se principo de Monroe estas aplikinda al Ameriko kaj Aŭstralio, ĝi estu egale aplikinda al Afriko kaj Azio. Azianoj havas nepre la saman rajton fari al blankuloj, tion, kion ĉi lastaj faras al tiuj. Oni diras, sin pravigante, ke kolorrasanoj povus detrui per senbara invad-enmigro tiujn gajnojn ekonomiajn, kiujn la lokaj laboristoj jam sukcesis pene almiti al si. Sed, kio malhelpus al lokaj registaroj eldoni leĝojn, kiuj devigu kolorulojn subiĝi sub lokaj vivkondiĉoj?

(9) "Aŭstralio por Aŭstralianoj."

Ankoraŭ pli hontinda! Pura ŝovinismo. Malamikaĵo kontraŭ la homaro. Kian rajton havas aŭstralianoj tion prediki? Ĉu proklami, ke Anglujo estas nur por angloj, Ruslando nur por rusoj, hinujo por hinoj, plaĉos al aŭstralianoj? Ĉi ties lando eĉ ne kapablas defendi sin kontraŭ invado de iu agresiva lando, tamen ĝi revas pri plena sendependado kaj izoleco. Mi legis la libron, "Watch The Pacific," kie reliefigas instinkta timo al Japanujo.

Konkludo.

Konklude mi diru, ke ĝenerale Aŭstralio bone impresas fremdulon rusan. Ni rusoj tre ŝatas la kondiĉojn de tiea vivo kaj la bonan klimaton. Ni estas danksentaj al la lando, kiu donas al ni rifuĝon. Multaj rusoj volonte akceptas subregatecon sub Aŭstralio kaj deziras al tiu lando sanan evoluon kaj ĉiuf flankan progreson, prosperon, ne forgesante emfazi ĝian ĉefbezonojn, nome plivastan mondrigardon kaj eniron en la grandan fluon de internacia pensado, kontakton kun la grandaj ideoj de tiuj laborantaj organizi firmbaze la universalan kunfratiĝon de la popoloj.

[Noto. La aŭtoro uzas "huliganismo." Ĉu la vorto estas trovebla en ia Esp. vortaro? Ĝi signifas angle "hooliganism."]

KURSO PER TRADUKO.

Kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A.

TRADUKO 17.

KAPTADO DE SOVAĜAJ HUNDOJ EN AŬSTRALIO.

Pursangaj dingoj ĉiujare fariĝas pli maloftaj. La ordinaraj dingoj devenas de pariĝo de pursanguloj kun domaj hundoj sovaĝiĝintaj; dum pli ol duono de jarcento estis multaj tiaj pariĝoj, kaj iuj el la miksrasuloj estas grande-gaj, fortaj bestoj, ruzaj kiel ŝafhundo fariĝinta safmortigema. Ili evitas kaptilojn kaj turnas sin for de venenaj logaĵoj. Ĉe bivakoj oni ofte rakontas pri famaj dingoj tiaj, kia estis unu dingino, kiu, liberiginte (1) sin el kaptilo je la kosto de piedo, dum multe da jaroj sukcese spitis siajn homajn malamikojn. Fine oni mortigis ŝin. Mi pensas, ke tio okazis per pafado malproksime.

Restaĵoj de dingoj estas troveblaj kun fosiliaj ostoj de bestoj, kies rasoj ne plu ekzistis antaŭ eble dek kvin jarmiloj.

(Fino)

VULKANOJ.

Estis du ĉefaj periodoj de vulkana aktiveco. La unua estis tiam, kiam la malvarmiganta supraĵo de la terglobo estis solidiganta, kuntiriganta. krevanta, kaj kaŭzanta pro tio tiel grandegan premforton, ke la fluida internaĵo premiĝis supren en la formon (2) de montoĉenoj. Post tio sekvis kvietaj epokoj,

dum kiu la kuntiriĝadoj de la internaĵo kaj supraĵo de la globo estis egalaj. Poste venis la nuna vulkana periodo. La tera krusto jam (3) estas dika kaj malvarmeta, sed la internaĵo ĉiam perdas varmon per konduko tra la supraĵo; ĝi ĉiam kuntiriĝas, kaŭzante la supraĵon sulkigi tiel, kiel sulkigas pomo, kiam ĉi tio perdas la malsekecon.

Tiel (4) la tera krusto ŝvelas, sulkigas, krevas, glitas. Pro ĝia premiĝo supren formiĝas montoĉenoj, dum pli malsupreniĝas la fundo de apuda oceano, ofte kaŭzante tre profundan akvon proksime al (5) altaj montoj, kiel ĉe la marbordoj de Ameriko kaj Nov-Zelando kaj laŭlonge de la longa etendiĝo de la marbordo de Kamschatcka ĝis la Japanaj insuloj.

Ĉar la tero en tiuj mondpartoj glitas por alĝustigi sin al novaj fizikaj kondiĉoj, la intensa interna premforto fandas la rokaĵon en lafon (6), kiu premiĝas supren, iom post iom pleningante la vulkanajn kraterojn. En iuj lokoj la lafo superfluas je regulaj periodoj, kiel en la vulkanoj de Havaii. Preskaŭ ĉiam la linioj de vulkana aktiveco estas laŭ la bordoj de maroj kaj lagoj, kaj en vulkanaj erupcioj ĉiam estas granda elsputado de vaporo. Jen kio okazas. La akvo de lagoj aŭ maroj penetras tra la teraĵon ĝis ĝi atingas la fandiĝintan rokaĵon. Tie ĝi transformiĝas en vaporon (6) de alta temperatura kaj premforto.

(Per tio ĉi la kurso finiĝas.)

NOTARO 17.

1. Adverba participo. Cox 211.—2. "En la formon." Kiam oni priskribas la finan staton de ŝanĝiĝinta objekto aŭ la rezultaton de aliĝo, oni uzas akuzativon post "en"; ekzemple: li rompis la vazon en pecetojn; demono turniĝi ofte povas en anĝelon (Ham.); la milito kondukas multajn en mizeron; Alexandro turniĝis en polvon (Ham.). 3.—"Jam" ĉi tie havas la signifon de la Angla "now" akcentata por esprimi ŝanĝon okazintan, ekzemple: la infano ploris longan tempon, sed jam ne ploras (is not crying now, aŭ "isn't crying any more").—4. "Tiel," thus, so, in such manner. 5.—"al" aŭ "de".—6. Vidu noton 2.

TRADUKA RONDO CEASES.

Regretfully we are compelled to announce cessation with this number of the translation course conducted by

Mr. George Gordon, F.B.E.A. For some time past the interest manifested has not been sufficient to warrant the time and labor entailed. This decision will doubtless be felt keenly by several who have regularly forwarded their work. To these we would warmly recommend correspondence with advanced Esperantists abroad and the faithful study of "La Plena Vortaro" (Grosjean-Maupin), obtainable through the A.E.A.

Mr. Gordon would be pleased to answer, to the best of his ability, questions as to Esperanto language and literature sent to him by any Esperantist whatsoever. Address: Union Bank, Christchurch, N.Z.

GEEDZIĜO.

Banham-Dawes:—Je la 28a de februaro 1931 geedziĝis en la metodista preĝejo, Palmerston-str., N. Carlton, Melbourne, Frank Reginald, unuenskita filo de Herbert kaj la estinta Florence Banham, de Lowestoft, Suffolk, Anglujo; kaj Hilda, sola filino de Percy kaj la estinta Amy Burr Dawes, de Maidstone, Kent, Anglujo. Faris la solenon Pastro G. F. Dyson.

ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That Sweden's most famous living author, M^{me}. Selma Lagerlof, has made a contract with La Eldona Societo Esperanto, Stockholm, for publication of all her works in Esperanto. Upton Sinclair, author of "The Jungle," a leading American writer, has also decided to have his books translated into the interlanguage.

That Jean Forge, author of "Abismoj," is at work on another original novel.

That the Berlin police had to moderate the enthusiasm engendered by the visit of Andrew Che, remarkable teacher of Esperanto, to that city. Hundreds have enrolled in his courses.

That Esperanto version of "All Quiet on the Western Front" met with tremendous success.

That the Director-General of the Bulgarian Post has again recommended Esperanto to the staff. An officially subsidised course in Esperanto has now been organised in the Postal School in Sofia.



That at Liverpool University, to which the late Dr. Buchanan left £4,000 for the founding of a lectorate in Esperanto, several eminent professors are adepts in the interlanguage. There are already chairs of Esperanto in the universities of Geneva, Zagreb, Krakow and others.

That the number of tramway employees speaking Esperanto is increasing every day. Trammen in Dusseldorf using the language are distinguished by a special armlet.

That at Lodz (Poland) a course of 50 police officers has been opened. Classes for German gendarmes will shortly be started.

That the Swedish parliament has again adopted without discussion a subsidy for teachers' Esperanto classes. The sum fixed was 2,000 kr. Courtrai (Belgium) has also granted a subsidy of 1,000 fr. for popular courses.

That Boulogne now has its Place Zamenhof. Congratulations to M. le Maire de Boulogne-sur-Mer.

"PER BALONO AL LA POLUSO" Gravsignifa verkego.

Post nur unu monato da laboro s-ro Stellan Engholm finverkis lastajn liniojn de sia belefarita traduko en Esperanton de la supra 400-paĝa libro. Herkulesa tasko sendube farebla nur de homo konsianta, ke li havas postkontrolanton, kia s-ro Paul Nylén.

La trimonata batalo kontraŭ la frostglave amrita naturo finiĝis per la malvenko de tri militantoj de la scienco, Andree, Frankel kaj Strindberg, kiuj, kun la fortoj konsumitaj, en mortmantelo falkuŝis, por restadi tridek jarojn dormantaj en arka silento.

La heroeo de la antikvaj "vikigoj" reflekte brilas el ĉi tiu eposo. El la vortoj de Andree mem oni sentas la animospiron de tiuj bravaj, vastevagaj lupoj de la nordaj maroj:—Kaj kiuj estas pli destinitaj ol ni svedoj por fari tian provon? Kiel alte civilizita popolo, delonge karakterizata de plej sentima kuraĝo, loĝantaj en la proksimo de la

polusregiono, intimaj kun ĝiaj klimataj proprecoj kaj de la naturo mem harditaj por elteni tiujn klimataĵojn, ni apenaŭ povas entute liberigi nin de certa sento pri devo en la dirita rilato.... Ĉu ne ni el inter ĉiuj aliaj nacioj estas vokitaj kaj konvenaj por plenumi la grandan taskon? Kaj ĉu mi eraras pri tio, ke same kiel ni esperas kaj atendas, ke la mez- kaj sudeŭropaj popoloj esploru Afrikon, same ili atendas de ni, ke ni traesploru la blankan mondparton?

La historio de la malfeliĉa flugo estas jam skelete konita de la gazetlega mondo. Tiuj multaj, kiuj povas senti korvibrojn de admiro, sorbante de la paĝo detalan vortbildon de grade malvolviganta tragedio heroeca, nepre posedigos al si ĉi tiun riĉe prezentitan volumon.

La verko estas cetere grava en tio, ke ĝi rajtas servi kiel esprimilujo por tiuj, kiuj, verkante pri arka esplorkipo, glacianda topografio, serĉos taŭgajn terminojn.

Surbaze de la notlibroj de Andree estas kompilita sekvaca rakonto de la tragedia ekspedicio, jam de ekiro el Ballonghuset ĝis la morteca sceno sur Viton. Tiam laŭvicas traduko de la Andree - taglibroj, stenografiaĵoj de Strindberg al sia fianĉino, kaj plena raporto pri la surpriza eltroviro sur la restaĵojn.

Notindaj estas: Tralibra uzo de sendeklinacia formo ĉe la datoj, ekz., "la 10 majo envenis inĝeniero N."; inici' (iniciat'); konstruktor' (konstruist'); ĉu balono povas "veli"?; guideropanta (konduk- aŭ gvidŝnura); loglibro (vojaĝlibro, ŝip(tag)libro); altaĝa (komparu profundaĝa, Zam.); p. 180-1 distrikto (regiono); 224 enparkigitaj (!); knoto, marmejlo (6086.7 futoj), Rhodes kaj Fulcher-Long havas "nodo"; impregnig (saturi); eratika (malkonstanta, sendirekte vaga; frikcio (froto); komuluso (kumuluso, amasiĝa); baŝliko; kalota; naŭtika (mar(ist)a, navigaci(art)a).

Pezpapere luksa. Prezo 10ŝ kaj 12/6 ĉe B.E.A.—Robo.

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiu donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

ANGLA GENTLEMANO.

Konsidere al la tutmonda intereso pri la Andree-a afero, ni presigas jenon el la taglibro de kapitano Scott, kiu pereis kune kun siaj subuloj ĉe la malfeliĉa sudpolusa ekspedicio en 1913.

"Vendredo, 16 (aŭ) 17 marto. Mi dubas pri tio, kiu nome estas la dato hodiaŭa, sed pensas la duan ĝusta. Bato post bato ĉiam faladas sur nin. Ĉe tagmezmanĝo kompatinda Oates (pron. otz) anoncis, ke li ne plu povas elteni la marŝadon kaj petsugestiis, ke ni lasu lin en lia dormsako. Tion ni kompreneble ne povis, sed sukcesis instigi lin ekprovi la posttagmezan marŝon. Spite al ĝia terura suferigo li baraktis antaŭen, kaj ni do faris plurmejlajn distancon. Nokte li montrigis pli malsana, kaj ni konkludis, ke lia fino tre alproksimiĝas. Mi petas, ke se iu trovos ĉi tiun skribon, oni diskonigos la faktojn rilate al li. La plejlastaj pensoj de Oates estis al la patrino, sed ĵus antaŭe li fieris en la kredo, ke lia regimento tre sentos honoron pro lia mortmaniero. Ni ja atestas lian bravecon. Dum semajnoj li eltenis teruran suferon sen ia plendo; ĝis la plejfino li vole diskutis aferojn ne rilatajn al nia situacio. Li ne rezignis esperon antaŭ ol la morto lin prenis. Vere li estis animo brava. Li ekdormis la antaŭlastan nokton, esperante ne vekigi, sed li devis ankoraŭ unu fojon vidi lumon de la mateno, tio estas, la hieraŭa. Ekstere de la bivako hurlis neĝventego. Li diris, "Mi iras eksteren; eble mi restos for iom longa tempo". Eliren li paŝis en la ŝtormon, kaj de tiam ni ne plu vidis lin. Ni sciis, ja, ke kompatinda Oates intencis iri renkonti sian morton, sed malgraŭ tio, ke ni penis persvadi lin ne fari tion, ni taksis ĝin kiel agon de brava viro kaj de angla gentlemano. Ĉiuj ni esperas fronti la vivfiniĝon en spirito simila al la lia, kaj vere la finiĝo ne staras tre fore. Ekstere la bivakono kirlneĝo vipadas. Ne estas plu esperinda ia pliboniĝo de nia situacio. Spite tion, ni tenos sufiĉe alta la spiriton ĝis la fino, sed vere ni ĉiam ankoraŭ pli malfortiĝas, kaj la fino jam ne povas tre prokrastiĝi. Afero bedaŭrinda...sed mi pensas min ne plu kapabla skribi (lasta noto) Pro Dio, ne lasu niajn familiojn mizeriĝi.

Klarigo: Oates iris el la bivako en la ŝtormon, por ne ĝeni la kamaradojn per la spektaklo de sia agonio.

Noto: Kabe uzis "ĝentelmeno" en "Patroj kaj Filoj"; Bulthuis en "Ido

de Orfeo" kaj Baghy en "Dancu Marionetoj" preferis "ĝentlemano"; Valienne en "Kastelo de Prelongo," "ĝentilhomon." La angla vorto havas diversajn signifojn, kiuj ne estas tradukeblaj de unu sama Esperanta vorto. Ĉi tie "gentleman" enhavas en si fundamentan ideon de "nobleco" kune kun tiuj de "(laŭnatura) kavlireco aŭ nobleco."

KRONIKO.

Perth, W.A.—Jen denove novaĵon de nia Societo en la Okcidento. Je la 12a la Sekretariino ricevis leteron de s-ro Pook en Waroona, W.A. per kiu li sciigis nin pri nova grupo, kiu starigis pro lia sindona laborado en tiu urbeto. Oni nomis ĝin la "Suna Grupo." Dekdu anoj jam komencis studi entuziasme nian karan lingvon. S-ro Pook estis elektita prezidanto, s-ro Murray sek. kaj kasisto.

Merkredon vesperon la 18an de Marto kelkaj anoj de la Perth Societo vizitis la ĉef-telegrafejon ĉe la G.P.O., laŭ afabla invito de s-ro Saar. Nova kaj interese sperto tio estis por ni ĉiuj. S-ro Saar interese klarigis al ni la multajn telegrafilojn; per iu ilo oni povas sendi kaj ricevi kvar sendaĵojn samtempe laŭlonge de la sama linio. Tre strange estis, rigardi la skribmaŝinojn, kiuj tipskribis aŭtomate.

Pro malfacilaj vivkondiĉoj iuj el niaj anoj ne povas ĉeesti la kursojn kiel antaŭe, tamen ni esperas ricevi novajn kaj malnovajn anojn post nelonge.

Masterton, N.Z.—La nia nova kurso de la jaro komencis Mardon, la 17an de Februaro. La membraro konsistas el de kok personoj, inter kiuj troviĝas du novaj anoj; kaj aliĝos frudate ankoraŭ du aŭ tri.

Novan lernolibron, "Step by Step," nun uzas nia instruisto, s-ro Dewar. La libro estas tre taŭga kaj donas plaĉon same al spertuloj kaj novuloj.

Oni decidis fondi grupan bibliotekon; kaj tiuj membroj, kiuj posedas Esperanto-librojn tre bonvole donis literaturon por helpi atingi la celon.

Pro la granda sukceso de la antaŭa fest-vespero, la grupo intencas aranĝi Esperanto-dancon post la okazo de la 2a N.Z. Kongreso, en Aprilo.

La lokaj redaktoroj ĉiam tre komplete publikigas informon pri Esperanto. Dum Februaro ses raportoj kaj kvar artikoloj aperis taggazete. Ni dissemu konstante!

Melburno, Vik. — En feb-o s-ro P. Holmes instrue parolis pri la fonografo kaj perdesegne ĝin ilustris sur nigra-

tabulo. Edison kiel unua eksperimentis en 1877, kiam li elpensis maŝinon, kiu, kvankam krude, reaŭdigis voĉon de la elpensinto. La son-ondoj estis stano. Grade la eksperimentoj progresis ĝis fine oni elektre aŭdigis la voĉon.

La 17an de marto okazis ekzameno entranĉitaj vertikale sur cilindro el folia por B.E.A. diplomo.

Reveninte el Canbera, s-ro C. Clarke estis kore akceptita je Societa kunveno.

S-ro Skurrie amuze fantaziis pri vojaĝo al la Luno. Lia priskribo pri la lunhomo kaj lunana vivo estis forte ridiga.

ADDRESS BEFORE POSTAL SERVICE.

On 25th February, before a representative gathering of all branches of the service at the Postal Institute, Brisbane G.P.O., Mr. Maurice Hyde delivered an interesting lecture, "Esperanto in the Postal Service." It was reported in the press, mention being made of the fact that the Superintendent Telegraphs and the Superintendent Mails were present. It is hoped to form a class, or, failing that, to establish a course of lectures.

SECOND N.Z. CONGRESS.

4-6th April.

The Second N.Z. Esperanto Congress was held at Auckland from Easter Saturday to Easter Monday. Arrangements were made for a public propaganda meeting, service at New Church, and a social evening.

RESPEKTIVE

(Al la "Suda Kruc").

Sinjoroj:—Mi konsentas, ke tiu uzo (vidu S.K., Decembro, 1930) de "respektive" estas ofta ĉe kelkaj eŭropaj verkistoj, sed ne bona. Fakte estas, ke la radiko "respektiv" estas uzata ĉe kelkaj lingvoj alie ol ĉe la angla lingvo. Mi (nativel!) preferas limigi ĝian uzon al tiu, kiun ĝi havas en angla lingvo.

Londono. —M. C. Butler.

ANONCOJ.

Interŝanĝas p.mkjn., kaj il. postkartojn afrankitaj bilflanke. Mi respondas ĉiam. Wilh. Lange, Petrikirschplatz 8, Eisleben, Germanujo.

I wish to correspond with Australian gentlemen in English. Willi Schneeman, Berlin S.O. 36, Wrangelstr. 86.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd. Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikadojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building." 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj anud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland)

Wellington Esperanto Club.—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.